

Heinrich Heine,
The Lorelei

tradukita de L. W. Garnham

Heinrich Heine,
Lorelej'

tradukita de Leopold Elb

Heinrich Heine,
Lorelej

tradukita de Ludwig Lazarus Zamenhof

Heinrich Heine,
Lorelay

tradukita de Hans-Georg Kaiser

Tiu traduko estas poste iom modifita de alioj, ne estas la origina traduk-versio de Leopold Elb.

I do not know what it signifies.
That I am so sorrowful?
A fable of old Times so terrifies,
Leaves my heart so thoughtful.

Ne scias mi, kial mi estas
Malgaja en la kor'.
Antikva fabelo restas
Por ĉiam en mia memor'.

Ne scias mi, kial subita
malgaj' en la koro naskiĝis;
el tempo jam enterigita
legendo al mi reviviĝis.

Min kaptas malgaj'
en la koro,
pro kio tia trist'?
Fabel' el antikva foro
ne lasas de mi kun persist'.

The air is cool and it darkens,
And calmly flows the Rhine;
The summit of the mountain hearkens
In evening sunshine line.

Vespero jam ekmal-heliĝas,
Fluadas la Rejn' en trankvil',
La supro de l' monto lumiĝas
En vespersuna bril'.

Jam malvarmetiĝas l' aero,
la Rejno mallaŭte babilas,
per oro de l'sun' en vespero
la supro de l' monto rebrilas.

Aere fridetas, trankvilas,
malhelas jam la Rejn'.
La monto surpinte brilas
vespere en rava scen'.

The most beautiful Maiden entrances
Above wonderfully there,
Her beautiful golden attire glances,
She combs her golden hair.

Belega knabino jen tronas
Kun ora juvelar',
La belan vizaĝon kronas
Mirinde la ora harar'.

Plej belan knabinon mi vidas:
en ora ornamo brilante,
sur supro de l' monto ŝi sidas,
la harojn mistere kombante.

Tre ĉarma feino sidas,
jen supre por ador';
la ora ornamo ridas;
ŝi kombas harojn el or'.

With golden comb so lustrous,
And thereby a song sings,
It has a tone so wondrous,
That powerful melody rings.

Ŝi uzas kombilon el oro
Kaj dume kantas ŝi.
Mirige tuŝas al koro
Sorĉiga la melodi'.

La oran kombilon ŝi movas
kaj kantas tra l' pura aero,
kaj forto mirinda sin trovas
en tiu ĉi kant' de l'vespero.

Ŝi kombas per ora kombilo
kaj kantas kun pasi';
mirigas min la elbrilo
kaj forto de l' melodi'.

...

...

...

...

The shipper in the little ship	Kaj sopiregon eksen- tas	Ŝipet' iras sur la rive- ro,	Ŝipisto ŝipeton gvi- das,
It effects with woe sad might;	Ŝipisto dum sia ve- tur';	ŝipisto ektremis de l' kanto,	lin kaptas ve' de ek- zalt'.
He does not see the rocky slip,	Rifaron li ne priaten- tas,	kaj blinda por ĉiu danĝero	Li ja la rifojn ne vi- das',
He only regards dreaded height.	Al monto rigardas li nur.	rigardas li al la kan- tanto.	li vidas nur supren sen halt'.

I believe the turbulent wa- ves	Mi kredas, ke dronos finfine	Ha, baldaŭ ŝipisto la bela	Mi kredas, ke ondoj tiras
Swallow the last shipper and boat;	Ŝipisto kun sia boat', Kaj tion kaŭzis feine	perdiĝis sub l' akvo- turnado;	la ŝipon funden de l' Rejn';
She with her singing craves All to visit her magic moat.	La Loreleja kantad'.	ĝin Lorelej' faris kruela, per sia mirinda kan- tado.	kaj tio de l' kant' eli- ras de Lorelaj-siren'.

*Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 - †1856-02-17) en la Anglan de L. W. Garnham.*

Arg-2-14 (2003-10-11
23:04:57)

L.W. Garnham, Bachelor of Arts, LEGENDS OF THE RHINE; mentioned in: A Tramp Abroad. Vol 1-2. Leipzig: Tauchnitz, 1880 Band I, Mark Twain 1880

*Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 - †1856-02-17) en Esperanton de LEOPOLD ELB (†1912-08.04).*

Arg-2-71 (2005-02-03
19:06:30)

La traduko troviĝas sur paĝo 84 de la lernolibro „Post la kurso“ de Wilhelm kaj Hans Wingen, eldonita de Ludwig Pickel en Nurembergo (Nürnberg), Germanio.

*Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 - †1856-02-17) en Esperanton de LUDWIG LAZARUS ZAMENHOF (Ludoviko Lazaro Zamenhofo, *1859-12-15 - †1917-04-14).*

Arg-2-565 (2009-10-30
16:15:09)

*Tiun ĉi traduk-
version mi prenis
el retejo <http://www.esperanto.mu.ru/Kolekto/Lorelej.html>.*

*Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 - †1856-02-17) en Esperanton de HANS-GEORG KAISER (Cezar, *1954-05-21).*

Arg-2-564 (2005-02-03
19:18:09)